# KOMITATO-KUNSIDO

4 bis, rue de la Cerisaie, 75004 Paris - Métro Bastille

## dimanĉon la 30-an de januaro 2022

### 0.1. Kontrolo de la ĉeestantoj kaj rajtigitoj

Dimanĉon la 30-an de januaro 2022, de la 10a10 ĝis la 16a, kunsidis parte rete kaj parte ĉeeste la Komitato de Espéranto-France.
[ĉeestas: S = fizike en la sidejo, R = rete pere de Zoom]

| PERSONA NOMO | FAMILIA NOMO | MALLONG. | KOMITATANECO | ĈEESTAS | SENKULP. | FORESTAS | RAJTIGAS |
|---|---|---|---|---|---|---|---|
| Michèle | ABADA-SIMON | MAS | Repr. de la membraro | s | | | |
| Alex | ANDRÉ | AA | Repr. de la membraro | | S | | |
| Véronique | BICHON | VB | Repr. de la membraro | R | | | |
| Bernard | CORNEVIN | BC | Repr. de la membraro | S | | | |
| Bruno | FLOCHON | BF | Repr. de la membraro | S | | | |
| Xavier | GODIVIER | XG | Repr. de la membraro | R | | | |
| Vincent | JACQUES | VJ | Repr. de la membraro | | S | | |
| Maurice | JUY | MJ | Repr. de la membraro | R | | | |
| Aleks | KADAR | AK | Repr. de la membraro | S | | | |
| Jean-Lucien | MAZEAU | JLM | Repr. de la membraro | | S | | |
| Christine | RAIFFAUD | CR | Repr. de la membraro | R | | | |
| Emmanuelle | RICHARD | ER | Repr. de la membraro | S | | | |
| Axel | ROUSSEAU | AR | Repr. de la membraro | S | | | |
| Gilles | TABARD | GT | Repr. de la membraro | S | | | |
| Paul | QUEVY-LEFEVRE | PQL | Repr. de la membraro | R | | | |
| Gilbert | STAMMBACH | GS | Repr. de fed. France-Est | | S | | BF |
| Marc | GIRAUD | MG | Repr. de fed. Paris-Île-de-France | R | | | |
| Florian | CEZARD | FC | Repr. de fed. Languedoc-Rouss. | ? | | | |
| Clair | MAHÉ | CM | Repr. de fed. Limousin | R | | | |
| Michel | DECHY | MD | Repr. de fed. Nord | R | | | |
| Laurent | PEUCH | LP | Repr. de fed. Bretagne | | S | | XG |
| | | | Repr. de fed. Poitou-Charentes | | | | |
| Thierry | SPANJAARD | TS | Repr. de fed. Provence | R | | | |
| | | | Repr. de FET | | | | |
| Bertrand | SAJUS | BS | Repr. de FKEA | | | F | |
| Elisabeth | LE DRU | ELD | Repr. de GEE / ÎLEĴ-Francio | | S | | PQ |
| Rémi | DENEU | RD | Repr. de fed. Auvergne | | | F | |
| Clément | BALEYTE | CB | Repr. de JEFO | | | F | |

16 komitatanoj ĉeestas el 26.    3 pliaj donis povon.

## ENKONDUKO

0.1 **Kontrolo de la ĉeestantoj kaj rajtigitoj** 05 min

0.2 **Elekto de prezidanto kaj protokolanto** 05 min
ER protokolas, BF prezidas

0.3 **Definitivigo de la tagordo, eventualaj aldonoj** 05 min

0.4 **Datoj de la venontaj kunsidoj** 05 min
27-28a de majo 2022 en Trelissac apud Périgueux, dum la interasocia kongreso de Esperanto en Francio
https://esperanto-france.org/kongreso-esperanto-france-2022

## 1. KUNORDIGO (administrado kaj financoj)

1.1 **Aliĝkampanjo 2021-2022** INFORMO 5 min (JLM)
Nombroj de membroj: ni havas pli malpli la saman nombron de membroj kiel lastan jaran en la sama periodo
Komento de Véronique: la grupo de Béziers ne plu funkcias, sed Béziers estas en FIK sistemo. Nun jam 4 personoj de la grupo sendis sian kotizon.

1.2 **Emeritiĝo de Susanna / Alveno de Saïd** INFORMO 10 min (BF)
Hieraŭ okazis renkonto en la sidejo kun la estraro kaj la volontuloj de la sidejo por danki Susanna kiu emeritiĝas kaj bonvenigi Saïd. La donaco de la mono kolektita estis farita, aldone al koltuko.

1.3 **Ĝustiglaboro de kontoj, priskribo de proceduroj** INFORMO 10 min (PQ)
Tiun laboron komencis Paul, kiu plurfoje venis en la sidejon por kompreni kiel funkcias la sidejo, la datumbazo kaj priskribi tion en diversaj slipoj kaj videoj.
Kun Jean-Lucien li ordigis kaj purigis kontojn.

1.4 **Enketo kaj ĝisdatigo de la listo de kluboj** INFORMO 10 min (CR)
Christine kontaktis federaciojn kaj grupojn kaj ĝisdatigis la koncernajn paĝojn en la retejo de Espéranto-France.
Restas kelkaj mankantaj informoj (Normandie, Paris-Île-de-France), kaj indas ĝisdatigi informojn en Arthur-datumbazo (kiuj aperos en la parto “L’espéranto près de chez vous” en la retejo).

1.5 **Buĝeto 2022-2023** DISKUTO 15 min (PQ)
Post la deficitaj jaroj 2020-2021 kaj verŝajne 2021-2022, denove la antaŭviditaj rezultoj de la jaro 2022-2023 estas negativaj, sed malpli grave ol tiuj de la antaŭaj jaroj Nepre necesas redukti elspezojn, ekzemple poŝtkostojn tamen sen rezigni pri niaj esencaj agadoj, kaj samtempe provi kreskigi la enspezojn per alvoko al pliaj donacoj, ĉu por la funkciado de la asocio, ĉu por specifaj projektoj.
Vidu la alkroĉitan buĝeto-dokumenton.

1.6 **Monalvoko de KoToPo:** kiel statas la subtenkampanjo? INFORMO 5 min (BF)
La situacio ne KoToPo ankoraŭ ne glatas. La daŭraj malfacilaĵoj lige al al sana situacio kaj limigoj de la registaro ne ebligis retrovi stabilan situacion. Novaj laborgrupoj studas la situacion kaj eblecojn restarigi sanan financan situacion. Konsiloj de entreprenistoj bonvenas !

1.7 **Raporto de la laborgrupoj** INFORMO 15 min (AR)
Hieraŭ Axel prezentis la funkciadon de la Arthur-datumbazo. Poste estis diversaj proponoj: plibonigi la enir-proceduron (ne nur per antaŭnomo/nomo sed ankaŭ ekz. retadreso), kiel ĝisdatigi personajn informojn (bankajn informojn, adresojn, ktp), enretigi gvidilojn por helpi la uzantojn. En la laborgrupo ili diskutis ankaŭ

pri la reta butiko, aliaj retejoj de lokaj grupoj (Provenco, Parizo…), kiel prezenti la eventojn.

## 2. KONSCIIGO projektoj, ERIK (= Eksteraj rilatoj, informado kaj komunikado)

2.1 **Rezulto de la enketo pri fameco de Esperanto** **INFORMO** 10 min (BF)

Ĝis nun nur 357 personoj respondis. Nur 3 personoj sendis rezultojn, el Nantes, Toulouse kaj Oloron Sainte Marie.
Michel jam vizitis multajn klasojn (150) de CM2 ĝis liceo. Ĉiuj ĉiam demandas, ĉu eblas lerni la lingvon en lernejo.
Ni daŭrigu la enketon. Eble Christine povas paroli pri tio, kiam ŝi kontaktas la lokajn grupojn.

2.3 **Budoj - salonoj**

Propono de la estraro: proponi al lokaj grupoj monhelpon por havi budon en lokaj salonoj. La komitato rimarkigis, ke ofte, lokaj asocioj havas probelmojn trovi hom-fortojn pli ol trivi monon.

2.4 Propono aldonita de Aleks, rilate al la propono pri **Google-reklamo** (Google Adwords). Jam Emilio Cid esploras tion en Brazilo. Se ni bezonos, ni povos kontakti lin.

## 3. KOMUNUMO (kongresoj, kulturo...)

3.1 **Kongresoj 2022 kaj 2023** **INFORMO** 05 min (BF)
La kongreso planita en Trélissac (apud Périgueux) por 2021 okazos en la sama loko de la 26a ĝis la 29a de majo 2022.
La aliĝilo disponeblas. Jam estas tempo por enskribi sin.
https://esperanto-france.org/kongreso-esperanto-france-2022

Lyon pripensas organizi la kongreson 2023. BF partoprenas la preparkunvenojn rete.

3.2 **Preparado de la membrokunveno: alvoko al kandidatoj** **INFORMO** 5 min (ER)
ER sendos al la listo de la komitato liston de membroj, kiuj restos, kiuj rajtos kandidatiĝi kaj kiuj ne rajtos.

3.3 **Papera versio por Esperanto Aktiv**: ĉu indas plu sendi paperan leteron? **DECIDO** 15 min (AR)
En la listo de la abonantoj, estas dumvivaj membroj.
Problemo estas, ke sendi la leteron estas multekosta kaj ankaŭ postulas multe da tempo. Raymonde jam atentigis por tio, kaj ne nepre deziras plu fari tiun laboron. Bezonas ankaŭ enpaĝigi la dokumenton, kaj tio postulas tempon. Nun la homo, kiu enpaĝigis ne plu povos fari tion.
Propono: peti al la sidejo printi la leteron laŭ la mendo, tial ni ne pagos por sendi al ĉiuj.
Demando: ĉu eblus kunigi LME kaj Esperanto-Aktiv?
→ nun la frekvenco ne estas la sama; malsamaj celoj, tamen artikoloj povas esti uzataj en ambaŭ publikaĵoj.
Ni ne forgesu la projekton publikigi komunan revuon.

Se ni ne plu sendos paperan leteron, ni unue sendu al la abonantoj informon por diri, ke ni ne plu sendos la leteron.

Voĉdono :
Ĉu ni ĉesu sendi paperan leteron al la abonantoj (kiel nun) kaj unue sendi informon al ili?
kontraŭas: 0 sindetenas: 1 aliaj poras
La propono estas akceptita

### 3.4 **Venonta reta festo** — **INFORMO** 5 min (BF)

La reta festo okazos la 19 an de marto, je la 18a ĝis la 19a30
Ideoj de kontribuoj:
ER petis de Malgosia, ke ŝi prezentu la libron *Promenado tra Vroclavo*
Peti de organizantoj de kongresoj prezenti siajn eventojn (Germana kongreso, Itala kongreso, UK…)
Prezenti la novan materialon MLA (se pretas)

Proponoj:

- fari demandon al la aŭskultantoj por scii kiuj temoj plej plaĉis al ili
- kvizon pri la enhavo de la reta festo, aŭ fine de la renkontiĝo aŭ unu demando post ĉiu kontribuo, por ke homoj atente sekvu la tutan renkontiĝon

Aliaj proponoj :
Kvizo / evaluo / interŝanĝoj inter geuloj (partoprenantoj)/ ludoj aŭ kantoj : ripeti kaj organizi dum la festo : "Kanto Parado"/rememoro pri Lidia Zamenhof (1942 en Treblinka.)
Aliaj pri la vivantaj flankoj de la lingvo ⇒ bonvolu doni la kontaktojn al BF

Ni pensu diskonigi la eventon.

### 3.5 **Eldonado** — **INFORMO** 5 min (AR)

kaj propono de Bernard pri vendado de libroj en librovendejoj

Estus bone, se BC verkus artikolon por klarigi, kiel fari por konigi esperantajn librojn en librovendejoj, tiel homoj povus fari tiajn agadojn en lokaj librovendejoj (ne eblas fari tion naciskale). Ni ne forgesu, ke estas "reguloj" pri distribuo de libroj: ekz. libro ne vendata en kelkaj monatoj reiros al la eldonisto aŭ estos detruitaj (do pliaj kostoj por la eldonisto).

### 3.6 **UEA: UK 2022 en Montrealo** — **INFORMO** 5 min (AK)

La sidejo ricevis poŝtmarkojn kaj glumarkojn por promocii la kongreson. Ili estas senpage disponeblaj surloke
UK okazos en Montréal de la 6a ĝis 13a de aŭgusto 2022 : https://uea.org/kongresoj /

Kaj : https://www.facebook.com/Montrealo.kongreso/

La kongreso okazos en UQAM: Universitato de Kebekio en Montrealo (Université du Québec à Montréal), konstruaĵo DeSève (320 St Catherine St E, Montreal, Quebec H2X 1L7), en la koro de la montreala urbocentro kaj en la kruciĝo inter tri ĉefaj metroaj linioj.

### 3.7 **UEA: Debata fazo pri vendo de la oficeja domo** — **INFORMO** 10 min (AK)

Estas aktuala debato en la estraro de UEA. UEA posedas 2 domojn en Roterdamo: la oficeja domo (kiun ili planas vendi) kaj la volontula domo (kie loĝas volontuloj). La debato estas malfermata por membroj de UEA.

## 4. KAPABLIGO (instruado kaj ekzamenoj)

### 4.1 **Eldono kaj disdonado de paperaj dokumentoj de MLA** (Multlingva Akcelilo) — **INFORMO** 5 min (ER)

Nuntempe ni finpretigas la kontroladon de la tekstoj (3 akademianoj helpas nin). Poste ni bezonos voĉe registri la tekston, prefereble de junuloj.
Ideo: peti de denaskuloj, ekz. gefiloj de Jesper kaj Lisa, aŭ de Bertrand Hugon.

4.2 **Ideo organizi videoretan kurson** **DISKUTO** 10 min (BF)

Ideo de Renato Corsetti.
En Liono, Andrea Bertrand gvidas retan kurson por 3 personoj el tuta Francio. En Perigordo Claude Labetaa instruas rete. En Lille, Katja Boen gvidas kurson.
Françoise Noireau ankaŭ gvidis retan kurson.
Marc Giraud nuntempe gvidas rete kursojn, sed li ne havos tempon post unu jaro por tia afero. Laurent Peuch ankaŭ gvidas kurson en Bretonio.

4.3 **Trejnado de aktivuloj : elekto de prioritatoj + volontuloj** **DISKUTO** 20 min (BF)

Temoj

- kiel instrui Esperanton
- kiel traduki, ekz. en la kadro de *Le Monde diplomatique*
- kiel verki kaj eldoni librojn
- kiel varbi, kadre de gazetoj, ĉe ĵurnalistoj,
- kiel starigi budon kaj deĵori
- kiel proponi librojn al librovendejoj
- kiel prezenti Esperanton / organizi konferencon
- kiel organizi kongreson
- kiel starigi lokan asocion kaj plu vivigi lokan asocion
- kiel peti subvencion
- kiel trovi volontulojn por fari simplajn taskojn (ekz. iri al la poŝto, purigi, ktp.)
- kiel verki artikolojn por vikipedio
- kiel verki recenzon

Estu demandaro al la membroj pri prioritatoj kaj registrado de interesuloj.

Uzi registradon de prelego ne estas facile por uzi ĉe Youtube. Plej bone esti fari specifan filmeton, malpli longan, por prezenti la saman temon.
Vidi kion faras Stefan Macgill kadre de AMO-seminario (aktivulo.net)
Alia : ret-rendevuo de Marion Quenut pri civita servo a 19a de februaro.

Venonta KK la 27an de majo en Trélissac. Aliĝu al la kongreso !
https://esperanto-france.org/kongreso-esperanto-france-2022